

Johann Wolfgang von Goethe, Heidenröslein	Johann Wolfgang von Goethe, <i>Roz' sur erikejo</i> <i>tradukita de Konrad Matheus</i>	Johann Wolfgang von Goethe, <i>Dornrozeto</i> <i>tradukita de Kálmán Kalocsay</i>	Johann Wolfgang von Goethe, <i>Rozeto en herbejo</i> <i>tradukita de Gotthilf Sellin</i>
Sah ein Knab ein Röslein stehn, Röslein auf der Heiden, War so jung und mor- genschön, Lief er schnell, es nah zu sehn, Sah's mit vielen Freuden. Röslein, Röslein, Röslein rot, Röslein auf der Heiden.	Vidiĝis eta ruĝa roz' de knab', sur erikejo. Ĝi belis en matena ros'. Hastis li al junia ŝos' admiri ĝin kun ĝojego. Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz', roz' sur erikejo.	Vidis knab': Jen, ju- na flor'! Rozujet' kampara! Bela, kiel la aŭror'! Li alkuris ĝoje por Vidi, kiel kara! Rozo, rozo, ruĝa roz', Rozujet' kampara.	Knab' rozeton vidis li, Vidis en herbejo; Estis juna, bela ĝi, Por ĝin vidi kuris li, Vidis kun ĝojego. Roz', rozeto, ruĝa roz', Rozo en herbejo.
Knabe sprach: „Ich breche dich, Röslein auf der Heiden!“ Röslein sprach: „Ich ste- che dich, Dass du ewig denkst an mich, Und ich will's nicht lei- den.“ Röslein, Röslein, Röslein rot, Röslein auf der Heiden.	Diris knab': "Mi rom- pos vin, rozo sur erikejo." Diris roz': "Dorn' pi- kos vin, por ke vi ne forgesu min. Al mi ne estu sufero. Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz', roz' sur erikejo.	Diris knab': Mi volas vin, Rozujet' kampara. Diris roz': Mi boras vin, Ĉiam vi memoras min, Pro l' dolor' amara. Rozo, rozo, ruĝa roz', Rozujet' kampara.	Diris knab': mi rom- pos vin, Rozon en herbejo, Diris roz': mi pikos vin, Ĉiam vi memoros min, Mi ne ĝin permesos. Roz', rozeto, ruĝa roz', Rozo en herbejo.
Und der wilde Knabe brach 's Röslein auf der Heiden; Röslein wehrte sich und stach, Half ihm doch kein Weh und Ach, Musst es eben leiden. Röslein, Röslein, Röslein rot, Röslein auf der Heiden.	Kaj knab' sovaĝa rom- pis ĝin, rozon sur erikejo. En defend' roz' pikis lin. Sed ve' kaj ah' ne hel- pis ĝin. Venis sort' sen tolero. Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz', roz' sur erikejo.	Knabo rozon ŝiris do De l' rozuj' kampara, Ĝi, defende, pikis tro! Sed ne helpis ve kaj ho Kontraŭ vol' barba- ra. Rozo, rozo, ruĝa roz', Rozujet' kampara.	Knab' sovaĝa rompis ĝin, Rozon en herbejo; Kvankam roz' defen- dis sin, En koler' ĝi pikis lin, Tamen morti devis. Roz', rozeto, ruĝa roz', Rozo en herbejo.
...

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22).

Arg-1022-2069 (2014-05-23 13:04:27)

La poemo troviĝas en <http://de.wikipedia.org/wiki/Heidenröslein>.
 Melodioj estas audeblaŭ en <http://ingeb.org/Lieder/saheinkn.html>.
 La plej konata Melodio estas tiu, kiun verkis Heinrich Werner. Pri tiu vidu la vikipedion [http://de.wikipedia.org/wiki/Heinrich_Werner_\(Komponist\)](http://de.wikipedia.org/wiki/Heinrich_Werner_(Komponist)).

Traduko de la Germana poemo “Heidenröslein” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de Konrad Matheus.

Arg-1022-2227 (2014-12-17 13:24:53)

S-ano Konrad Matheus loĝas en Mühlenweg 20, D-33038 Nieheim, Germanio.

Traduko de la Germana poemo “Heidenröslein” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaločajo, *1911 – †1976).

Arg-1022-2226 (2014-12-16 16:56:40)

Tiu ĉi poemesperantigo troviĝas interalie en <http://egalite.hu/kalocsay/eterna/dornrozeto.htm>.

Traduko de la Germana poemo “Heidenröslein” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de GOTTHILF SELLIN (*1844-05-18 – †1921-10-09).

Arg-1022-2071 (2014-12-16 16:00:17)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en http://kantaro.ikso.net/rozeto_en_herbejo. Tie oni povas audi ankaŭ la melodion. Pri la tradukinto vidu la retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Gotthilf_Sellin.